


*Probal Daŝgupto****La arĝenta barko***

La silika hakilo, de Jorge Camacho, eld. Mondial, Novjorko, 2011, 134 p.
ISBN 9781595692269.



La poemon *La ora barko* de Robindronath Tagor mi esperantigis¹ ĉefe por povi diri al vi, ke ne al tiu ora barko proponas siajn vortojn la poeto Jorge Camacho. Ne nur al ĉiele eternaj dioj kaj sanktoj li malkredas. Li malpermesas al si eĉ la penson, ke nia parnasa spirito principe kapabligus nin surtere eterni, se ne katenus nian ĝenan karnon la mortemo. Camacho senkompromise loĝas en sia konkreta ekzisto, parolas el tiu sidpunkto, kaj insistas konstrui el tio poetikon.

Ekruliĝas antaŭ vi emfaze *mia* prezento de io, kion mi nomas la poetiko de Camacho.

Vi ne nur rajtas min malfidi, sed ĉi-pere estas invitataj dubi, skeptiki, rekonsideri. Nur tiuvoje ekestos konversacio. Mi havas komune kun Camacho la emon pleje elstarigi la valoron de la konversaciado. Tial mi tute sen embarasiĝo eseas pri ideoj propraj, kiujn mi parte vestos per versoj el lia poemaro *La silika hakilo*. Ĉu fari tion estas trompi vin, kiu volas legi pri la recenzata poeto kaj ne tiom atenti la voĉon de la eseanto?

La rolon de recenzanto komparu kun ĉiĉerono kunveturanta kun vi en aŭtobuso, kiun ŝoforas la aŭtoro ĉefe por vi, la meza ordinara pasaĝero. Ĉu vi atendas de la ĉiĉerono pasaĝerecon neordinaran, ekzemple komplikan kun la ŝoforo? Ĉi-foje vi vin trovas antaŭ ĉiĉerono, kiu proponas kelkajn minutojn mem stiri la aŭtobuson por povi pli efike montri ion. Demandu vin, ĉu tiu movo detruas vian veturulan amuzon, *leganto hipokrita, ho similul', ho frato!*² Ho partoprenanto en nia organiz-farĉita kulturo, kies instancoj senĉese prezentas ĉiajn

1 Vidu BA16 (februaro 2013), p. 15-16.

2 La referencon al la pria verso de Baudelaire vi povas mem pergugli se vi aliĝis al la retaj generacioj; se vi estas nealiĝinta veterano, vi nepre konas vian Baudelaire pli bone ol mi; miajuĝe legantoj de neniu generacio do petos de mi bibliografiajn detalojn por "– Hypocrite lecteur, – mon semblable, – mon frère!"

facetojn de la ekzisto kiel *agadojn!* Kiamaniere do via veturula moŝto, prigustanta la implicojn de tiu ĉi unuafoje renkontita vorto *vetur-ul-o*, komprenas la rolojn de diversaj partoprenantoj en la *vetura agado*?

Vi eventuale pensas, ke la demando estas simpla, ĉar la komuna saĝo deklaras la ŝoforon plej agema veturulo, la pasaĝeron plej pasiva, kaj la ĉiĉeronon intera. Sed la cirkonstancoj ofte efikas sur la juĝojn, kiuj devenas ja de konkretaj spertoj, ĉu ne? Kiam vi troviĝas en aŭtobuso kun bona ĉiĉerono, ĉu la kontrasto inter ĉi ties prezentemo kaj la deva silentado de la ŝoforo ne subfosas vian aprioran supozon, ke la ŝoforo estas la plej aktiva partoprenanto en la vetura agado? En la ĉeesto de ĉiĉerono konanta sian fakon kaj “afabla je vortoj”, via pasaĝera moŝto ne nur sentas sin amuzata kaj partoprenigata, sed ankaŭ ekkonas la solidajn faktojn, kiujn vi intencis ‘viziti’ aŭ alimaniere ekkoni; sen tiu intenco vi ja ne entreprenus la vojaĝon. Aliflanke, vi eble rezistas la emon revizii vian konvinkigon, ke nenio povus esti pli roke solida ol la fakto, ke veturigas la ŝoforo kaj ne la ĉiĉerono. La juĝoj dependas de viaj juĝemoj, kara amiko.

Se vi flaras en la figuro de ŝtona solideco rilaton al *La silika hakilo*, vi evidente ne eraras. Por ne fali el la esea ĝenro en la krimromanon, mi tuj anoncas, ke mi uzos koncepton de *faktoj* kiel ŝlosilon al la recenzata poemaro. Mi revenos poste al la konsisto de la faktoj – ne ĉiuj el ili montriĝos silikaj. Al mia lega okulo Camacho ŝajnas rekompreni la *naturon* kaj la *kulturon* kiel formaciojn de *faktoj* resp. *faktanoj*. Mi krome tezas, ke lia verkado dotas la bildon per plia akso, kies polusoj *scii* kaj *koni* modulas la faktanecon de la spertantaj faktanoj, kaj tiamaniere ankaŭ la faktarecon de iliaj spertoj.

Mi faris ĉi tiujn anoncojn por tiuj legantoj, kiuj ŝatas jam frue aŭdi, kion la teksto strebas atingi. Evidente necesas ĝislabori ĝis tiuj komprenoj. Ni komencu nian laboron ĉe la konstato, ke poeto rajtas meti en la centron de sia poetiko ne nur la intencan konversacii, sed eĉ la emfazan babilemon. Iom paŭzu por kapti, pri kio temas ĉi tie.

Jen mallonga poemo sur p. 33, *La nomo*, ekzemplanta mian tezon: *Se l' vastan universon/ konsistigas vakuo,/ neniu miru/ ke kristanoj plej saĝe/ sian ĉefidion nomas/ la eter-nulo.* Kiel tiu ĉi laŭ mi babilema voĉo distingas sin de ekzemple alia poeto verkinta jenon pri nomoj? – *En Ekbatano/ ĉefbankisto fro Babel./ Kiu vi estis,/ negocante kun Kuraŝ,/ Itti-Marduk-balatu?*³

Edwin de Kock, kies identecon la prepozicio *fro* sendube tuj rekonigis al vi, havas interesojn sendube parencajn. Li ĉi tie prezentas

3 *Identeco*, de Edwin de Kock, sur p. 6 de lia *Japaneskoj* (Pyramid, Sud-Afriko: la aŭtoro, 1982).

establitan sinjoron en klasika socio, kiu, ĉirkaŭate de vivuantaj, brave-antaj subuloj, kompatinde kredis sin eterne memorota kaj rekonota. Sed mi tezas, ke tiun maleternan konkretecon Camacho malsame aliras. Li prezentas ne nur sian bildobjekton kiel finian, sed sin mem kiel senembarasan amanton de sia finieco, kiu pro tio insistas babili kaj ne simple konversacii.

Lian senembarasan rilaton al la konkreta efektivo de la amanteco konvenas prezenti pere de la poemeto *mondoj*. (Gravas tuj emfazi, ke en lia poezio la vorto 'mondo' sisteme signas la homan mondon, diference de la naturo, la kosmo, la universo, la tero.) Ĝi tekstas: *la hommondo/ kaj la bitmondo/ kunfandiĝas/ konfuziĝas/ kiel korpo koitanta/ kun ektoplasmo* (p. 27). Samgrade kiel la ordinara kaj evidenta erotiko, ravas lin ĉiuj aliaj pulsantaj procezoj de la ekzistado. En lian vizion de tiu pulsado tiu ĉi poemo senĝene enprenas la komputilan hodiaŭon – kaj tuj elvokas *ektoplasmon* por ĝin ligi al la historio de niaj manieroj sperti tiujn *mondojn*, karne-vivajn kaj alimode vivo-partoprenajn, inter kiuj pulsas la persona ekzistado. La epiteto 'persona' pli ol 'homa' esprimas la poetan subskribon de Jorge Camacho. Tion mi diras kun plena konscio pri la etimologia fakto, ke en la latina oni nomis 'personoj' maskojn. Al Jorge Camacho treege gravas la vizaĝoj de diversaj *partoprenantoj* en tiuj *faktoj*, kiuj serie kaj kontinue konsistigas la ekzistadon, ĝenerale, kaj la vivadon, plej konkrete.

Tiujn vizaĝojn ni legantoj de poemoj ricevas tra la filtrado de vortoj kaj nomoj en lingvo, pro kies ecoj Camacho sentas apartan respondecon. La ŝlosila poemo *starpunkto* (p. 87) tekstas jene, zorge ekzamenende: *trans Taĵo* [nomo de rivero, kiun situigas por ni piednoto]/*kuŝas ne Transtaĵo/sed Lisbon'*,/*kaj trans Tibero/ne Transtiber' etendas sin/sed Aventin'*. Esperanta poeto ne misuzu la laborilojn de sia lingvo por forskemi la efektojn, en kaj apud kiuj ni loĝas.

Sed tiu ĉi poeto estas ne nur fidela sed ankaŭ amika al nia skemema lingvo. Laŭ lia poetiko, nia racia vortilara kerno spronu nin kree rekombini la pensojn de memkonscia revanto pri mondo ebligonta racian distanciĝon de la praaj luldioj de la homaro. Tial la poemo *nombroj* (p. 36): *Unuo plaĉas al Viŝnuo,/ duo al Manituio,/ trio plaĉas, nu, al Dio,/ kvaroj al Iŝtaro,/ kvinoj al Odino,/ sesoj al Ramseso,[...] kaj miliono – al mia liva kojono*. Temas rekombini do la pensojn kaj, libid-reliefige kaj sakre por ne esti miskomprenata trans kulturaj limoj, la sentojn de homo ne nur racia sed pasie amanta la racion.

La racio estas unuavice ne tiu matematika logiko, kiun oni tro ofte fetiĉe prezentas kvazaŭ mastran ŝlosilon al kiu sklavu ĉiuj aliaj pensfadenoj, sed la fakto, ke la homo, vivinte kiel infano, plenkreskas

al racia estostadio kaj kapablas plenrajte kunpensi kun aliaj maturaj homoj. Camacho estas odanto pri la libero mature pensi. Lia prototipa homo estas liberama en la senco, ke li volas ne esti posedata. Al tiu logiko estas fremdaj la trudaj postuloj de nacia nio, kiu insistas, ke vi devas esti niano. Ĉi tiu poeto de la suvereneco de la unuopula homa digno fojfoje rite sakras por malebligi forgeson pri la konstanta fakto, ke li parolas nur por sia neposedata memo kaj ne ambasadoras ceremonieme kaj dece por grupo deziranta pere de li esprimi sian kodon de honoro.

Li ne volas esti posedata, sed li deziregas aparteni. Personskale aparteni al sia amhomo – ĉi tion lia poetiko havas komune kun ĉiu poetiko – kaj grandskale aparteni al homamo, kiu en lia vizio sin vestas kiel la fenomenon ‘ili’. Ĉi tie mi intence ĵonglas inter la pronomo *ili*, esprimanta la transtempnan kolektivon de ĉiuj ekde la prahomoj, kaj la verbo *il-i*, temanta pri la fakto ke tiu kolektivo sin distingas disde la simioj kaj kreas sian kontinuecon ĉirkaŭ esenca rilato al la iloj. En Camacho fariĝas gravega la fakto, ke la hakiloj silikaj estas legeblaj kiel la tekstaj inkunabloj de la skribema homo. Kreante siajn ilojn per konkreta penado, la eklaborantaj prahomoj skribas sin en la arkeologe legeblan kajeron, kiu lanĉas la historion.

Camacho rezervas siajn plej intensajn kolerojn por tiuj personoj, kiuj perfidas sian homecon per agoj aŭ sintenoj rekoneblaj kiel stultaj aŭ aĉaj per la klara simptomo, ke ili nebuligas, stompas, haltigas, platigas, nelegebligas, nedaŭrigebligas la esencan historiecon de la homoj. Diference de la poetikoj de la makrosocieto-pretendaj nacioj, tiu de Camacho distingas sin per la insisto, ke la historiecon la vere kaj unike makrosocia homaro kristale esprimas ĝuste en nia sennacia lingvo. Ĝi ne trudas al la individuo tiujn senelektajn, senraciajn ‘pra’apartenojn, false praaajn, per kiuj reklamas sin kiel grandskalajn kaj historiajn niaj nacioj.

Kiam Camacho vere volas havi praaĵojn, li iras al la arkeologoj kaj legas la aŭtente praaajn silik-hakilajn tekstojn, dankon. Li rifuzas akcepti la senperceptan gvidemon de kretenaj kaj stultigeme lulaj pastroj. Li vidas kun hororo, ke en la manoj de tiaj pastroj lanĉiĝis la laŭdire historiaj sinlaŭdaj kronikoj de la ŝtatestroj kaj de iliaj laŭdire diaj egidantoj ankoraŭ ombrantaj sur la penson de hodiaŭaj homoj.

La instinkta opoziciemo al la praaaj ŝtatoj estas trajto, kiun la poetiko de Camacho havas komune kun la centraj fadenoj de la *Poemo de Utnoa* de la tre malsaminspira kaj alitona ibera poeto Abel Montagut. Sed Camacho krome malamikas al la centra impulso de la modernaj ŝtatoj. Reeĥe al liaj kalemburoj, mi proponas paroli pri lia malŝatemo al

pastroj kaj... piastroj. Konsideru el la poemo *la homaroj* (p. 19) jenan teksteron: *kapitalistoj/ per mono (plia lingvo)/ kampojn,/ korpojn,/ mortojn/ tradukas, metaforas.* Ĝi antaŭas kaj subtenas la plenan tiuteman poemon *la mono* (p. 23): *de kiam la monon oni inventis,/ ni homoj legas ĉion mone.*

Atentu dislegi lian kritikon de la mono sur p. 23 disde la treege diversaj kritikoj tra la jarcentoj. Camacho listigas objektojn de pasia ŝato antaŭ ol hurli, ke la mono platige detruas ilian unikecon: *kampoj kaj domoj,/ korpoj, koitoj,/ bildoj aŭ vortoj,/ murdoj kaj mortoj/ (silkaĵ, silikaĵ),/ idoj kaj dioj,/ revoj kaj veroj,/ pensoj, objektoj/ ekse unikaj/ – ĉio moneblas.* Sinjorinoj kaj sinjoroj, Camacho legas kaj pastrojn kaj piastrojn kiel malamikojn de la *historieco* de la homo pro tio ke ili subfosas la *unikecon*, la *faktecon* de la faktoj. Tiu subfosado aspektas al li horora, ĉar ĝuste en la solideco de la efektivo serĉas stabilan azilon la signifosifaj faktanoj konataj kiel homoj.

Tiu entrepreno serĉi stabilan azilon prenas en la poemoj de Camacho la formon de la avida sciemo. Sin pasie klerigante pri aliaĵoj kaj aliuloj, li atingas sin mem kiel konanton-konaton. Lia sio ne estas lejbnica unuopaĵo, nek neŭtrala nodo difinata de senpasia reto kiel retero esence interdependa kun ĉio kaj ĉiuj aliaj enrete. Male, lia sio ankriĝas en la tero – ne senmotive Camacho estas fervora ŝatanto de la Anteo-figuro en la poezio de Mao Zifu – por de tie ĉerpi la scio-forton per kiu rezisti la konstante atenceman ‘mondon’. Kalocsay versis pri mondo kaj koro; Camacho, pri mondo kaj tero, kiuj diferencas lingve.

Kiel deklarite en *la mondo* (p. 21), *la mondo estas/ falsa,/ false ŝirma,/ minaca// danĝera pli ol la natur’./ dura, kruela, kruda// sintruda, tentakla, tumora, tenaĵla* – kaj oni povas enfokusigi centrojn de tiu fieco – *la mondo estas klinga labirinto,/ ideala panoptiko/ de tiranoj realaj.* Camacho akuzas la tiranojn ne pri simpla brutaleco, sed pri la por li plej nepardonebla peko, la forstompado de la klareco alstrebanda de kuraĝaj sciemuloj – tirani estas malpreti ion riski: *la mondo estas ruz’ konfuza,/ koŝmar’ kovarda.* Kaj tiu ĉi fenomeno, samtempe granda (*olda kiel la sumo de l’ civilizacioj*) kaj beba (*kristale efemera,/ protea*), estas kvintesence la ejo de la lingvado – *la mondo estas lingva, simbola/ spegul’ de niaj timoj kaj deziroj.*

Kial ne troviĝas aparta poemo ‘la tero’? Ĉar poetoj traktas pri la tuta estaĵo, ne pri la vizaĝo – la tero estas por ĉi tiu poeto la vizaĝa fonto de kuraĝo, per kiu prezentas sin al li *la universo* (p. 18), kiu *silentas al ni, homoj,/ en silento obstina, persista,/ ne de persono ferminta la buŝon firme, neniodire/ pro motivo plej nobla, kanajla aŭ simpla,/ sed de ŝtono.* Li rifuzas la tenton provi alparoli la universon diige: *kaj la dioj?/ ho, la ĉiama klopodo, bela strebo/ doni voĉojn al malvoĉo/ – alparoli ŝtonon.*

Kiam reliefas al li la fakto, ke *la universo/ havas do nul signifon, sencon, celon aŭ direkton*, ĝi aspektas al li kiel *stranda ŝtono*.

Kaj el tiu fakta ŝtono la homoj, la faktanoj, fasonas alian efektivon, ekde kiam ili, farante al si silikajn hakilojn, ile lanĉas la historian, la arkivan, la de ni posteuloj legatan lingvecon. Tiun momenton pane-giras la hakilforme aranĝita poemo *la silika hakilo* (p. 15): *malgraŭ tiom da instruoj/ la historio ne komenciĝis ĉe la oldaj/ sumeraj kojnosignoj... sed dekmilojn/ da generacioj pli frue.../ ni prenu, ekzemple, silikan ŝtonhakilon.../ kaj legu ĝin.../ ĉi ŝtonan hakilon ni legu/ kiel bravaan epopeon pri sennomaj herooj*. En tiu sama epoko naskiĝis la 'dioj', la vana klopodo de la homoj per alifasonado de la ŝtono paroligi la universon. El nia retrospektiva vidpunkto ni devas kompreni, ke kunnaskiĝis kun la 'dioj' la tasko – entreprenata en nia tempo – iam elvekiĝi el tiu iluzio.

En la epoko de la lingvo-skriba historio, la mono, ĝemela al la skribitaj dokumentoj – vidu ĉi-supre miajn vortojn pri la poemoj *la homaroj kaj la mono* – fariĝas suplementa lingvo. Ĝi unuavide aspektas pozitiva faktoro, kapabla preterporti nin trans la silikan epokon, kapabla traduki unikajn, loke-katenitajn strebojn en grandan, unuecan strebejon kaj esprimi la memstaran kolektivitan kreivon de la homaro. Sed la mono mem en sia efektiva disvolviĝo aspektas pli natureska ol konscie-homa. Ĝi manifestas tiun ciklan malstabilemon, kiu karakterizas la fenomenojn de la natura universo.

La poemo *la cikloj* komencas sian iron ne ĉe la natura bildo *en la naturo,/ kiam vulkan' aŭ fajromonto reeruptas/ post periodojn longa letargio,/ lafo riveras arde al la valo*, sed ĉe la eksplodemo de la mono: *unu matenon/ pri krizo ĉiuj ekparolas, milionoj/ iĝas senlaboraj, milionoj/ da ŝuldoj ĉie* (p. 22). Por plene legebligi la konturojn, kiujn mi vidas en la poemaro de Camacho, mi proponas jenan komprenon pri la mono kongruan kun *la silika hakilo*. Eble dementos ĝin lia venonta poemaro – tiam la kantanton akompanos alistila flutado.

La mono estas iugrade en si mem fakto, kaj tiugrade ĝi estas ŝtona; malgraŭ sia iugrada lingveskeco, ĝi tial ne nur mutas al la homoj, sed en siaj eruptaj momentoj eĉ sufokas la kapablon de la homoj paroli inter si kaj frukte kunlabori. La solideskaj rokoj kaj la elvulkananta lafo estas substance samaj: se la mono ĉiam restos senbride ŝtona, ĝi ĉiam ciklos tra krizoj.

En la lingvaĵo de mia komentario, la mono do estas faktoro, kiun faktanoj povas aŭ lasi en tiu fremdeco (kaj tial cikle suferi), aŭ refasoni per malfremdiga laboro. Tiun laboron malebligas la ekonomikistaj konsilantoj al la princo, kiuj pastre arogis al si la rajton oficiale kompreni kaj priverdikti la monon. Ni memkonsciaj faktanoj, kiuj volas refasoni

la monan ŝtonon en materialon por loĝeblaj hejmoj, devas rezisti tiujn pastrojn de la piastroj. Por povi ilin percepteme rezisti, ni devas ankoraŭ pli fajli niajn proprajn kapablojn legi la perceptojn de aliaj. La forĝejo de la poezio estas unu taŭga loko por tiu fajla laboro.

De la poeto Camacho ni lernas jenan tiuterenan tagordon. – Oni ne povas malklere percepti. Por ke vi perceptu, vi devas lerni legi la silikan historion de la laboro. Volante legi, vi nepre devas rimarki la cirkvitan geometrion de tio, ke legante nun vi relegas jamajn legojn aliulajn. La deziro kompreni la spurojn de la pasintaj laboroj spronas vin al reedukiĝo uzanta du procedojn. Unue, elradikigi el via koro la lerneje truditan kredemon al pastraro posedanta la skribajn tekstojn. Due, planti en via psika humo novan legipovon; ĝi vin konatigu kun tiuj, kiuj home laboris dum jardekmiloj, sub oftege malhumanaj kondiĉoj, kaj kiujn oni sisteme trompas ekde la instaliĝo de piastroj kaj pastroj.

De kie mi ĉerpas ĉi tiun legon de aspektoj de la vizio de Camacho ne esprimitaj en specifaj poemoj? Mi deduktas ĝin i.a. de lia emo sisteme eviti la mallaborajn, nur-belajn ornamojn. Kiam mi diras, ke li liveras sian kargon ne al la ora sed al la arĝenta barko, mi pensas ne nur pri la kontrasta Tagora figuro el mia kulturo, sed pri la traktado de la luno ĉe Camacho. Sentitola poemo sur p. 44 tekstas jene, forĝante el kutimaj prilunaj tropoj odon al la laboro: *De steloj, planedoj/ la lunrikoltilo/ rikoltas/ po eron da brilo.// De ni, dupiedaj,/ jam/ plian/ lunon/ da viglo.*

La poemaro *la silika hakilo* nenie panegiras al la suno. Al Camacho gravas, ke la luno l a b o r a s por legi, ke la luno *rikoltas* brilon de aliaj lumfontoj. Per tiu ĉi elekto la poeto senvorte mesaĝas, proksimume, “Ankaŭ vi konsciu pri la duaviceco de la lega laboro. Luno, kiu ĉerpas la brilecon de diversaj fontoj kaj ĝin rikoltas, liveras al vi modelon de serioza, konscia lumanto: ĝi sin prezentas ne kiel fonton aŭ verkanton, sed kiel refasonanton de alfluanta lumo.”

La luno ne aŭdigas al nia poeto la arĝentan tintadon de moneroj. Lia prezento de la luno forigas de la eksaj bildoj ilian piastran venenon.

Iuj legantoj reagos per malkredema oscedo al mia interpreto premisanta la intencecon de la manko de sunaj poemoj. Mi komprenas, ke vi povas bezoni argumentojn: jen do unu. *Ambiguo* (p. 76) tekstas: *Sur ĵurnalfoto/portreton/ enorman/ de Franco, Mao, Mubarak,/ sennomaj homoj tenas alte ĉe la mur’/ (manke de dato,/ apenaŭ divenebles/ ĉu ili ĝin almetas aŭ./ male./ jam trenas fine for).* Tiu ĉi poemo evidente subkomprenigas aludon al la kutima ambigueco de bildo interpretebla kiel sunleviĝa aŭ sunsubira. Sed atentu, en tiu ĉi libro vere ne troviĝas poemo odanta al la suno, al subsubiroj, al sunleviĝoj. La aŭtoro volas, ke la leganto laboru por kapti liajn aludojn kaj subkomprenigojn.

Inter la aludaj poemoj mian atenton plej kaptis *Eltrovoj* (p. 72): *hodiaŭ mi eltrovis/ ke mi estas/ iomete kolorblinda// ankaŭ/ iomete/ rasisma// mi abomenas/ arabojn/ judojn/ ĉinojn/ ciganojn/ indianojn/ aborigenojn/ kaj eĉ nigrulojn/ sed nur iomete.// ĉiutage oni lernas ion novan*. La poemo nete rememorigas pri la formato de *Mankas krotaloj* de Auld.⁴ Eĥe omaĝante tiun konatan poemon, la verko de Camacho faras novan movon, direktante la lumon ne sur komunumon sed sur iun individuon, kiu strebus sin draŝi per niatepe oftaj akuzoj. La leganto do estas invitata noti la eĥan aludon kaj ankaŭ la alifokusigon: tio kostas laboron. Tiu ĉi poeto invitas vin kunlabori por serioze legi lin.

Ĉi-punkte nia komentario devas enfokusigi Auld kiel unu prabardon, al kiu ŝlosile referencas la tuta poetiko de Camacho. Auld verkis en du modoj. Li arkitektis sian kosmon en *La infana raso*. Poste li loĝbligis sian konstruon en *Humoroj* kaj aliaj loĝpoemoj. Lian tutan laboraron trafadenas forta skeptikemo. Li uzas sentiman universalan sciemon batalile kontraŭ dogmoj malnovaj, el la dia epoko, kaj apostoladoj modernaj, ekzemple marksismaj.

Camacho trempis la vizion de Auld en la poetiko de sia dua prabardo Ragnarsson, kiun la roka Islando dotis per la kapablo poete loĝi ne unuavice en la homa mondo sed en la natura universo. Al la universalecoj de tiuj prabardoj Camacho aldonas sian pasian, plurlingvan, multvojaĝan, eretan atentemon al detaloj sub la lupeo de specifa, senbreĉa scivolo – detaloj meblantaj lian loĝadon en voja hejmo. Li sin prezentas kiel survojan al plene memkonscia loĝanteco en *home legata kosmo*; dum tiu vojaĝo, li loĝas-vojaĝas en veturhejmo (pro kio mi umis pri pasaĝereco kaj ŝoforeco en la komencaj movoj de tiu ĉi eseo). Per sia metaforo de la silika hakilo kiel la homara pralegaĵo – kaj per la propono identigi la eklaboron al la skribarto – li establas novan rilaton al la ŝtona pejzaĝo de nia islandano. En Camacho, la prahomo fasonanta la silikan hakilon, verkanta ĝin inkunabile, perverkis sian rajton legi la malmolan, mutan pejzaĝon, en kiu necesis fondi la verbon loĝi, instali la hejmon, la homan fakton ke homoj azilas unuj ĉe aliaj – pioniri la faktanecon, en la lingvaĵo de nia komentario.

Ĉi tiam mi rajtas malkaŝi, ke per la elvoko de faktoj, faktanoj, fakteroj, mi daŭrigas ideon lanĉitan en la *Postvortoj* (p. 119-125) verkitaj de neniŭ alia ol Baldur Ragnarsson. Li proponis rigardi Camacho kiel fondinton de ‘organisma realismo’; mia faktidaĵa aparato celas dismeti ĝuste tiun hipotezon. Nun mi faros la lastan movon en tiu ĉi teoria rezonfadeno.

4 Ni havas *financistojn/ politikistojn/ ĵurnalistojn/ televidon/ prudulojn/ kaj ankaŭ aliajn/ venenaĵojn./ Sed krotalojn/ ni ne havas.// La vivo povus esti/ eĉ pli malagrabla. (En barko senpilota: plena originala poemaro, red. Aldo de’ Giorgi: Pizo: Edistudio, 1987, p. 438.*

Por ke la sciemo estu sentima, necesas draste ataki la timon mem, kaj tiucele malpaki la kategorion timo en la formo de poeziebla rakonto. Tiun celon trafas *En la epoko de la egroj* (p. 97): *Okazis en la epoko de la egroj/ ke grizaj korvoj kampojn superflugis/ kaj urbojn, kun omene krudaj grakoj./ Homoj ektimis morton aŭ militon./ fuĝis sur vojojn al la valoj foraj/ ĝis plenforĝeso de la propra ter'./ Jen kial nun neniu plu memoras/ eĉ onidiron pri la gravaj egroj./ fantomaj ankaŭ je la nobla nom'.⁵ Ĉu ĉi tie temas simple pri racio kontraŭ timo? Kion simbolas la forgesiĝo de eĉ la nomo egroj?*

Mi proponas reiron al la tankao *En Ekbatano* de Edwin de Kock citita komence de mia rezonado, kaj tiubaze sed tamen alie interpreti ĉi tiun specifan forgesiĝon de pranomoj. Ni havas aferon kun egroj ne celantaj majestatan stelecon kaj eternan memoratecon. Al ili je tia katastrofa grado mankas eĉ la minimumo da racia sentimo, ke ili permesas al la malbonaŭguraj korvoj forgraki ilin de ĉe si mem – ekzili ilin de la principo hejmo, de la fasonado de la propra loĝado en la homa, la labora, historio. Pro tio ni hodiaŭ, laborante super palimpsestoj, ne plu legas iliajn spurojn.

La sanktecon de la hejmo tiu ĉi poeto, ne malfidele al la romantikoj en ĉiuj poezitradicioj, fondas sur la amo, sur tiu baza interkono, kun kiu intense interligiĝas la sciemo. Tial la ĉeesto de la ampoemo *la logo* en la komenca movimento de la libro. En la tekstero *preter ĉiuj ŝminkoj, maskoj kaj vualoj virinigaĵ./ mi sentas vin plia korpo homa./ unu plia adolta mas' el karno./ necerta en la profundoj./ aktora en la surfaco* (p. 16) la poeto ligas la aktorecon kun la kapablo sin vesti kaj maski (produktataj de la laboro), kaj metas demandosignon sur la profundan internon.

Kial la homa persono valide sentu sin *necerta en la profundoj*?

Mi konjektas, surbaze de la nuna lego de Camacho, ke faktano rajtas *koni* alian faktanon, sed ne rajtas *scii* faktanon kvazaŭ ŝi estus nura faktero – kiom ajn sciemige fascinu nin la povo *dialogi suple kaj humide/ per niaj karnaĵoj kavaj, pintaj./ kvazaŭ dizajnitaj⁶ por ke oni buŝu ilin temp-avide*. Ĉar la interpretado estas esence tia procezo, ke unu interpretanto ne rajtas plene scii, fakte, alian interpretanton dum tiu

5 Sendube la penso, ke el la timo fontas homkolektivaj katastrofoj, praesprimiĝas en Auld – *sub la malvarma feblo de distaj sunoj/ ni trolojn timos, kaj klanajn najbarajn frakasos* (*En barko senpilota*, p. 401) – krom se mi preteratentis pli fruan aperon de tiu interpreto en Kalocsay aŭ Baghy aŭ Miĥalski. Sed ĉi tie temas pri pli ol tiu diagnozo.

6 **dizajni**: projekti la strukturon, formon kaj aspekton de produktota objekto, por ke ĝi estu utila kaj/ aŭ bela (“dezajni” en *NPIV*; preferindas “dizajni”, kiel en *ReVo*, por ke la radiko laŭeble malsimilu je “desegni”). [Gloso ne recenzista-*Almanaka*, sed reproduktita el la poemaro.]

alia restas viva kaj interpretanta. Ni estas konsistige misteraj unu al la alia. Sen la kombino de la nefinieco de la interpretado kaj la emfaza finieco, mortemeco, de la interpretantaj faktanoj, ni ne havus la fakton de la amo, sur kiu, ĝis la fino de la tempo kaj poezio, restos bazitaj la revoj pri la hejmo, en kiu la faktaneco loĝas kaj la faktereoj estas sciataj kaj reinterpreteblaj.

En la hejmo, ĉiu hejmano estas luno rebrilanta pro la brilo de la alia, ni lernas ĉe Camacho, kaj neniu el ili sin provas establi sune mastra en sia hejmo. Jen poetiko de serioze pripensita egaleco, kiu devas eki en la hejmo mem. Se reveni al la ibera skolo, Abel Montagut prezentas en sia *Poemo de Utnoa* alipejzaĝan, frape atentindan modelon de egaleco inter la viroj kaj virinoj. La fakto, ke la poeta konstruo de Jorge Camacho trafas paralelan klavon, kreas tian orkestron, kian neniu antaŭe aŭskultis, kaj pro kiu devas senti sin danka ĉiuskola komentarianto pri tiuj versoj.

Ricardo Felipe Albert Reyna

Protea poemaro

La fontoj nevideblaj, de Baldur Ragnarsson, eld. Mondial, Novjorko, 2010, 127 p., ISBN 9781595691743.

Unua provo, kvazaŭ ebria

Kiam mi akceptis la proponon, ke mi recenzu ĉi tiun poemaron, unu el miaj amikoj komentis al mi, ke li ne kuraĝus recenzi verkon de tia giganto, kia estas Baldur Ragnarsson. Mi memoras, ke mi pensis: *Nu, finfine, nur la Fundamento estas netuŝebla. Do kial mi ne risku kontroli la fendojn de unu el niaj idoloj? Mi pretas fariĝi martiro de recenzistiko, kiu, bone pripensite, estas nur parazita arto aŭ tekniko; do ĝi meritu cedi antaŭenpaŝon al pli nobla okupo, kia estas poezio. Tio estis, pli-malpli, miaj apenaŭ skizitaj pensoj. En la unuaj semajnoj mi defiis la maron da poemoj apenaŭ flosante, ĝis mi rimarkis, ke mi drivas en senborda oceano. Kaj mi komencis timi, ke mi envenis labirinton sen elirejo. En la tropiko de mia recenza periplo mi malsaniĝis je recenza*

